

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por donpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

II:a jaro.

Oktobro 1897.

N:o 10 (22).

El Francujo.

Kvankam ni silentadis dum kalkaj monatoj, la legantaro de nia gazeto ne devas pensi, ke la propagando de Esperanto kaj ĝiaj progresoj haltis aŭ malfortiĝis en nia sfero de agado. Kontraŭe, ni ĝoje konstatas, ke nia granda ideo kaj Esperanto mem estas pli serioze, pli favore rigardataj de tre meritaj homoj, en Francujo kaj en diversaj landoj, kun kiuj ni korespondas. El la ricevitaĵaj leteroj, el la opinioj, kies eho atingas nin, eliĝas la kuraĝiga fakto, ke multego da skeptikaj rigardantoj kliniĝas al ni, perdinte nun parte aŭ tute sian dubantecon antaŭan. Vole nevole oni devas akcepti ke Esperanto vivas, ke ĝi publikigas broŝurojn, artikolojn pri ĉiuj specoj da temoj, tute same kiel nacia lingvo; oni pli kaj pli sciiĝas pri ĝia facileco mirinda, pri ĝia praktika uzebleco, kaj, antaŭ faktoj nedisputeblaj, oni komencas demandi sin, ĉu eble ni estus rajtaj vidante en Esperanto la necesan lingvan organon por la komunikoj internaciaj. — Kio komenciĝis, tio perfektiĝos kaj plenumiĝos, iom post iom, se ni konservos nevenkleban paciencon. Fortika murego ne falas je l' unua, je l' deka, eĉ ofte je l' centa bato; sed se la atakantoj ne ĉesas sian batadon, venas momento en kiu, malfortigita de ilia frapado konstanta, ĝi fine ŝanceliĝas kaj teren disfalas. — Kion faris la unuaj batoj al la murego? Ekstere nenion la plej ofte. Tamen interne ili nevideble komencis la finan dispeciĝon. — Tion ĉi ni devas memori en nia propagando. Antaŭ ni staras kolosa murego, konstruita el malveraj ideoj kaj fortigita, dum centjaroj, per antaŭjuĝoj aŭ sofismoj. — Komprenoble ĝi ne povas disfali rapide. — Kiel longa batado estos necesa por detruĝi ĝin, neniu scias kaj povas diveni. — Sed ju pli rapidaj, ju pli kuraĝaj, ju pli fortaj kaj multaj estas la batoj, des pli frue renversiĝos tiu ĉi murego. — Atendante la horon de ĝia disfalo, ni armu nin per senlima pacienco, per senfina konstanteco, kaj ni pensu ke ĉiu frapo, ĉiu bato, se eĉ oni ne vidas la rezultaton, akcelos sekrete la finan sukceson.

Eble la amikoj trovos, ke ni ĉiam ripetas la saman aferon; sed tion ĉi ni faras intence. — Ĉar, laŭ nia juĝo, ni devas gardi nin severe de danĝera

konfidego pri facila kaj tre rapida sukceso. — Ĉiu granda eltrovo, ĉiu nobla reformo iradis paŝete en la mondo kaj venkis nur post longa batalo. Tion ĉi ni speciale devas enigi en la spiriton de l' novaj adeptoj, por ke tro forta espero de rapida triumfo ne nasku ĉe ili malkonfidon pri la ebleco mem de l' venko, kiam ili pli ĝuste mezuros kaj pesos la malfacilaĵojn de l' entrepreno. Por ni la plej grava, kaj eĉ la sole grava afero, estas la senĉesa, senhalta irado antaŭen. — Brilo momenta, bruo sendaŭra nenion pravas pri la estonteco de afero; sed oni povas havi plenan konfidon pri ĝia sorto kaj vivo, se regule, kvankam eble modeste kaj malrapide, ĝi daŭrigas sian marŝadon antaŭen. — Kaj tion ĉi, ni ĝin scias, Esperanto ne ĉesis fari, de l' unua tago de sia naskiĝo, en kondiĉoj tiel malfavoraj, ke, se ĝi devas morti, ĝi estus jam milfoje mortinta.

* * *

Ni havas la ĝojon sciigi la amikojn, ke, dum la lasta somero, S:o A. Roux, nova sed varma kaj lerta apostolo de nia ideo, konigis Esperanton en Svisujo per elokventaj paroladoj publikaj, pri kiuj raportis tre laŭde diversaj ĵurnaloj de l' lando. — Altirita, kiel multaj aliaj, de la artikoloj Esperantaj en l' "Etranger", li tuj komencis, post ellerno de la lingvo, ĝin disvastigi ĉirkaŭ si. — Lia aliĝo estas tiom pli signifa ke li havas kompetentecon apartan en la lingvaj demandoj.

Je l' sama epoko ni ankaŭ ricevis la tre gravan aliĝon de doktoro Balinth, profesoro de la lingvoj turanaj en la universitato de Kolozsvar (Hungarujo). Li estis altirita per la lego de l' artikolo kiun nia amiko, s:o Moch, skribis en la "Revue des Revues" kaj ankaŭ en la "Revue de Sociologie" pri lingvo internacia ĝenerale kaj pri Esperanto aparte. Doktoro Balinth skribis al mi, en nia lingvo, ke li jam komencis konigi Esperanton al siaj lernantoj. Ni devas tiom pli ĝoji pri tiaj aliĝoj, ke ili estas alta rekomendo por nia lingvo, ĉar oni ne povas nei, ke homoj de nedisputebla valoro en la lingvistiko ne povis akcepti Esperanton naive kaj blinde. Kiam ili proklamas ĝin mirinda, kredeble ili scias kion ili diras.

Kiel akiro bonega ni ankaŭ kalkulas la aliĝon de S:o Bel, bibliotekisto de l' universitato de Montpellier. Li egale komencis labori por nia afero, tuj kiam li konis Esperanton, skribinte rimarkindan artikolon, en kiu li anoncas ke ĉe li oni trovas ĉiun informon pri nia lingvo.

Certe, niaj amikoj rimarkis ke, de du jaroj, s:o G. Moch fariĝis militanta esperantisto. Sed eble multaj ankoraŭ ne scias, ke li publikigis, en la lasta somero, broŝuron tute laŭdindan kaj admirindan, sub la titolo: "La question d' une langue universelle et sa solution par l' Esperanto". Lerteco, scienco, konvinko, varmeco komunikiga: jen estas la ecoj de tiu verko bonega. Ni ne kredas ke senpartia homo povus ĝin legi kaj ne fariĝi esperantisto, tiel la demando estas klare, logike kaj nerebateble prezentata. Nun mi jam ne bedaŭras, ke la tempo ĉiam mankis al mi por skribi tian verkon, ĉar nia amiko efektivigis supere nian de longe karesatan revon.

* * *

Estas alia revo, kiun mi nutras ankaŭ de tre longa tempo: mi volas diri la fondon de franca societo speciale farita por propagandi Esperanton en Francujo, kaj eĉ alilande, per la lingvo franca. Nun mi kredas, ke la horo venis efektivigi tiun revon, ĉar de diversaj flankoj oni puŝas nin al la dirita

fondo, kaj la kondiĉoj, en kiuj Esperanto sin trovas nun en Francujo permesas esperi sukceson por la entrepreno. Tiu societo ne havos la karakteron de loka klubo; ĝi funkciados paralele kun ĉiuj eblaj kluboj kaj tute sendepende, kiel ĝenerala unuiĝo de personoj, laborantaj je la disvastigo de Esperanto per la lingvo franca. Ĝia regularo estos kiel eble plej mallonga kaj simpla, por ebligi tre facilan disvolviĝon kun tre larĝa akceptado de membroj. Tiuj ĉi formos trioblan kategorion: aprobantoj, aliĝantoj, vastigantoj. Por pleni lokon en la tria kategorio, oni devos altiri almenaŭ 5 aliĝantojn al Esperanto. La unua kategorio konsistos el homoj aprobantaj nian lingvon kaj interesantaj sin je ĝia vastiĝo, sed kiuj, pro kelka motivo, ne povos aŭ ne volos lerni ĝin. Plenumante la kondiĉojn difinitajn, ili ĉiam havos la eblecon iniri en la duan kaj eĉ en la trian kategorion. Ĉiuj membroj enportos egale kaj ĉiujare la modestan monoferon de 3 frankoj.

Samtempe ni kreos folieton sub la titolo "L' Espérantiste français". Tute diferenca de "Lingvo internacia" kiu estas kaj devas resti la centra organo kaj ligilo komuna de ĉiuj Esperantistoj, la nova folieto servos nur kiel organo propaganda, vastiganta Esperanton per la lingvo franca. Pro sia rolo ĝi estos skribita plej grandaparte en la lingvo franca kaj nur partete en Esperanto. Ĉiuj membroj de l' franca societo por la propagando de Esperanto ricevos la folieton senpage. Cetere, niaj amikoj legos pli detalan klarigon, koncerne tiujn entreprenojn, en venonta numero.

* * *

Post longa meditado pri la ortografo de l' prograĵ nomoj en Esperanto, mi pensas, ke oni povas trovi sistemon pacigantan la opiniojn tiel malsamajn, kiuj estis esprimitaj en nia gazeto pri tiu ĉi temo. Mi prezentos al la amikoj, post iom da tempo, manieron efikan, mi kredas, por tio ĉi.

* * *

Kvankam tre varma partiano de la pacaj ideoj, mi pensas ke la Esperantistoj devas esti tre prudentaj en sia aliĝo al la pacaj societoj. Alie, kiel konsentis kun mi la nobla apostolo de l' paciga movado, s-o Frédéric Passy, ili povus malutili al la diritaj societoj, kaj reciproke. Nin kaj la pacemulojn oni rigardas ankoraŭ tro ĝenerale kiel naivaj utopiistoj, por ke oni povu marŝadi profite, en plena lumo, sub la sama standardo. Se ni tion farus, ni duobligus al ni en multaj okazoj, la malfacilecon de l' venko. La Esperantistaro riskus malhelpi al siaj progresoj, ligante sin korporacie kun la Pacemularo. Efektive, personoj pretaj aliĝi al Esperanto, sed ne akceptantaj la ideojn de l' pacemuloj, sin deturnus de ĝi, kredante ke nia lingvo estis en efektivo farita por servi al la propagando de l' paciga movado. Tiel Esperanto inspirus malkonfidon al multaj homoj kaj suspektojn al kelkaj registaroj. Ni severe devas eviti la montron de ĉiu sento, la esprimon publikan de ĉiu opinio, kiuj povus kredigi, ke, sub la preteksto de lingvo internacia kaj per Esperanto mem, ni servas la interesojn de unu partio religia, politika aŭ alia. La Esperantistaro devas resti tiel neutrala kiel sia lingvo pri ĉiuj demandoj disputataj en la mondo. Cetere ni memoru, ke nia gazeto, pro artikoloj tuŝantaj tre delikatajn kaj diverse vidatajn objektojn, devis ŝanĝi sian nomon, sian formon, la lokon kaj kondiĉojn de sia presado, por povi denove penetri en landon, kies cenzuroj ĝin ne enlasis plu. Ni do estu prudentaj kaj singardemaj.

tute neebła. Ekzistas por tio-ĉi alia vojo, nome fondi filion de l' S-Peterburga societo Espero, sed ni bedaŭrinde havas nenian membron el tiu-ĉi societo, kaj laŭ la regularo de tiu-ĉi societo peto pri fondiĝo de ĝia filio devas esti subskribita de ne malpli ol 5 el ĝiaj membroj. Sekve kaj tio-ĉi estas en nuna tempo al ni neebła. Alia afero, kiun bezonas Moskvo, estas vendado de esperantistaj libroj. Ĝis nun ni havas nur unu magazenon, kiu vendas librojn de nia literaturo, librovendejoj de s-ro Konusov. Sed lia magazeno estas malgranda kaj lokita en tre neoportuna loko, pro kio sekve niaj libroj estas vendataj en tre malgranda nombro; ni do bezonas, ke ilin havas plej bonaj librovendejoj de Moskvo. Havante tre malmultajn financojn nia Rondeto ne povas mem aĉetadi librojn kaj disdonadi ilin por komisiono al Moskvaj librovendistoj, sed se esperantistaj eldonantoj sendos al ni siajn verkojn, notante kian rabaton ni povas fari al librovendistoj, ni ne sole volonte disdonados ilin al Moskvaj librovendejoj, sed ni mem vendados ilin kaj estos tre dankemaj al la sendintaj ilin al ni pro ilia helpo.

Nun do ni deziras diri al ĉiuj kunbatalantoj nian koran saluton kaj aldoni, ke kvankam ni komence havas tre multe da malfacilaĵoj, tamen ni esperas venki sub la signo de nia kara lingvo Esperanto.

Prezidanto *V. Fedorovski*.

* * *

Pri Esperanto parolis: Al la redakcio de nia gazeto oni sendis la n:ron 157 de "*Blekinge Läns Tidning*", (Karlskrona, Svedujo), enhavantan, krom anonco per kiu d-ro I. Asklöf proponas sian helpon al homoj dezirantaj konatiĝi kun nia lingvo, artikolon pri "Esperanto kiel parola lingvo". Tiu artikolo citas svedan tradukon de la letero de s-ro Kazi-Girej el "L. I." n:ro 5-6 pri lia vojaĝo en Svedujo. — "*Nykjöbings Venstreblad*" (Danujo) n:roj 246, 247, 248 redonas paroladon de s-ro P. K. Toksvig pri "Esperanto en la servo de l' afero pacana". Ni tra legis kun granda intereso tiun paroladon elokventan kaj riĉan je faktoj. — Unu numero de la rusa gazeto "*Novosti*", laŭ eltondajeto sendita al ni, enhavis versaĵon (de s-ro K. Ostanieviĉ) en Esperanto kun rusa traduko proza.



Letero al la redakcio de "Lingvo Internacia".

Kun kia granda bedaŭro mi devis diri "adiaŭ!" al miaj karaj svedaj amikinoj kaj amikoj! Kaj nun tiuj ĉi tri semajnoj de mia estado en Stockholm ŝajnas al mi kiel rava, belega sonĝo, kiu forflugis por eterne sed restigis post si eternajn rememorojn kelkajn el la plej ĉarmaj de tuta mia vivo.

Al mi, juna fraŭlino, ŝajnis ja terure vojaĝi tute sola en malkonatan landon, (kaj mi decidis je tio ĉi sole plenumonte deziron de mia mortinta amiko J. W., kiu multege amis Svedujon kaj volis, ke mi ankaŭ ĝin vidu), sed veninte tien, mi tuj eksentis min kiel inter plej bonaj amikoj, plej proksimaj, amantaj parencoj... Kaj, vere, mi povas diri, ke neniam ĝis nun kaj nenie mi vidis tiom da afabla, bona amikeco, kiel nun, dum mia sufiĉe longa gastado en la kara Sverige.

Stokholmon oni ne vane nomas "belegan"; ĝi efektive estas bela kaj vidinda urbo, sed al mi, kies okuloj al kutimis al larĝeco de Peterburgaj stratoj kaj bonegaj trotuaroj en Varsovio — ŝajnas tre mirinde, ke tio granda kaj bela ĉefurbo havas tiajn mallarĝajn kaj mallumajn stratojn kun malbonegaj

trotuaroj el negrandaj ŝtonoj, iafoje eĉ tute ne pavimitaj. Mi komparas Stokholmon kun nia Kiev, kiu havas egale malbonajn stratojn, jen leviĝantajn sur monteton, jen ree krute malleviĝantajn. Sola diferenco estas, ke Stockholm ne havas eĉ ion similan je Kieva ĉefa strato "Kreŝĉatik" kaj ne estas lumigata per elektra lumo, kiel tiu ĉi lasta. Vere, ke Kiev ne havas maron. Tamen, ĉu nia Dnipro ne estas egale belega, kiel maro?

Tamen, por juĝi pri beleco de Stockholm, oni devas nepre vidi ĝin el "Katarinahissen" (elevatoro): el tie la nura okulo povas ĉirkaŭkapti la vastecon de tiuj ĉi belaj insuletoj, kovritaj per originalaj laŭarĥitektaj konstruaĵoj, (jes, en Stokholmo la domoj tute ne havas tian maldiversan ordinaran vidon, kiel en Rusujo), eltranĉitaj per golfoj, kun sennombraj vaporŝipoj kaj ŝipe-toj, sur kiuj tiel bele staras disblovitaj flugiloj de blanka velo... Tiu ĉi pentraĵo estas rava. Kaj en ĝi, certe, antaŭ ĉio turnas sur sin atenton la ekspozicio, precipe ĝia alta, hela "Industrihallen".

Oni jam tiel multege skribis pri tiu ĉi ekspozicio en ĉiuj naciaj gazetoj, ke mi ne bezonas tie ĉi ripeti, sole mi volas diri kelkajn vortojn, pri tiu ĉi industria paviljono, kie precipe al si tiris mian atenton porcelano, kristalvitro, meblo kaj virinaj manlaboraĵoj; tiuj-ĉi lastaj estas belegaj kaj vere artistaj. Rusa parto, en kiu tuj mi prenis rolon de gvidanto por miaj svedaj amikoj, kun ĝia teo, brando, faruno, orŝtofo (parĉa), mielkukoj de Varsovia fabriko I. Wrublevski (mirinde, ke ili estas kaŝitaj sub vitro kaj ne vendataj; ĉu oni povas juĝi pri ilia gusto per okuloj?). Multaj feloj, kiujn mi komprenas tre malmulte, rusaj brodaĵoj kaj punktoj, kaj samovaroj... ho, mi estis vere ravigita, ekvidinte samovarojn! Ŝajnas, ke restas ankoraŭ multo, sed mi ne povas ĉion nomi; eĉ mia kara Ukrainujo ne estas forgesita, kaj en parto de infanaj ludiloj mi trovis modelon de kozako, kiu plugas per bovoj; ankaŭ ja estas iom da sunfloraj semetoj, kiujn mi havis multe ĉe mi, kaj kiujn svedoj rigardis kun miro kaj tuj manĝis kun plezuro.

En turista paviljono plej bela, certe, estas panoramo de norda nokto, tia majesta, kaj tiel nature malvarma, ke mi eĉ sentis tremadon. Paviljono de armeo kaj floto, kie mi havis plezuron amike saluti malnovajn konatinojn — artilerian pafilegon kaj tendaron; paviljono de pentraĵoj modesta laŭ eksteraĵo, sed granda, kun 35 salonoj, plenaj da sennombraj pentraĵoj, el kiuj oni povas noti sole: "Julafton vid grafven" (Kristnaska vespero apud tombo) de sveda artisto Hesselbom, "Tempera" el Kalevala de finlandano Gallén¹⁾, "Zaporoĵci" de rusa pentristo Riepin kaj kelkaj pli aŭ malpli belaj pejzaĝoj kaj maraĵoj — jen ĉio; el skulptaĵoj plej bela ŝajnas al mi "Vågen och stranden" ("Ondo kaj bordo") de sveda skulptisto I. Lundberg. Jen ĉio, kion mi trovis indan! Vere, ke mi postulas de pentraĵoj tre multe; tial eĉ en "Nacionalmuzeum" mi elektis nur du pentraĵojn: Karlo XII portata per siaj soldatoj, kaj meze kontraŭ ĝi egale granda pentraĵo, figuranta morton de iu heroo. Tiu ĉi "Nacionalmuzeum" estas simila je Peterburga "Ermitaĵo", sed ne tiel granda.

Multe plaĉas al mi "Skansen" kun sia Laplanda vilaĝo — se estas

¹⁾ Tie ĉi la aŭtorino sendube malkomprenis la svedan katalogon. La vorto "tempera" (aŭ a tempera, en détrempe) nur signifas, ke la pentraĵo estis farita per aparta speco da koloroj. Estis en la ekspozicio tri pentraĵoj, prezentantaj scenojn el la Kalevala fabelo kaj ĉiuj pentritaj "a tempera" de tiu ĉi pentristo.

eble tiel nomi kelkajn laplandajn tendojn, malbelajn, malkomfortajn, en kiuj loĝi mi tute ne komprenas la eblecon. Laplandanoj mem, kaj precipe laplandaninoj ankaŭ ne posedas belecon, nur iliaj vestoj estas belaj, diverskoloraj kaj originalaj laŭ vido. Sur Skansen oni povas vidi popolajn dancojn, kiuj estas belaj, sed ŝajnas al mi tro malvarmaj; almenaŭ en ili ne estas sentata tiu fajro, pasio, kiun oni vidas en dancoj polaj, ukrainaj kaj eĉ rusaj. (Je okazo: sveda "Ringdanco" estas tre simila je rusa "Ĥorovod".)

Belegan vidon prezentas la ekspozicio vespere, kiam ĝi estas lumigata per elektra lumo kaj senmombraj diverskoloraj lampetoj. Precipe oni devas rigardi ĝin el Skansen — tiam oni vidas sub siaj piedoj tutan diverskoloran fajran maron.

"Sagogrottan" (fabela groto) prezentiĝas efektive kiel sorĉa fabelo — tiuj ĉi muroj kaj arkaĵoj, brilantaj per diverskoloraj, ĉiumomente ŝanĝantaj lumoj...

Jen estas antikva Stockholm, kun koridoroj anstataŭ stratoj, kun malvastaj, altaj kaj severe rigardantaj domoj, mallumegaj kaj malkomfortaj interne; urba placo, ne pligranda ol nuntempa korto, kun fonto kaj hontega kolono en ĝia mezo; gardantoj en antikvaj vestoj — ĉio tio-ĉi transportas nian imagon al antaŭlonge pasintaj tempoj, kiam vivo fluadis laŭ alia ordo kaj moro, kaj la homoj mem estis aliaj... Kaj senvole oni sentas ian strangan respekton, kvazaŭ en ĉambro de ĵus mortinta konata.

Tial multnombraj tabletoj de bierejo sur tiu ĉi placo prezentiĝas kiel disonanco kaj arogante rememorigas pri *nuna* vivo...

Se diri ankoraŭ pri plej originala laŭ eksteraj paviĵono de kandela fabriko (kies nomon mi forgesis) — en formo de arĝenta kandelingo kun grandega kandelo en ĝi — tio ĉi estas ĉio plej vidinda sur la ekspozicio, almenaŭ laŭ mia opinio. Sendube, se mi venus rigardi la ekspozicion kiel ordinara turisto, ĝi ne farus je mi tian ĉarman impreson kiel nun, kiam mi estis gvidata per miaj bonaj amikoj-svedoj...

Tamen, se diri sincere, malgranda kaj modesta Upsala ŝajnas al mi pli ĉarma, ol Stockholm... Ĝi rememorigas al mi niajn negrandajn urbetojn en Ukrainujo kun ilia modesta kaj trankvila vivo. Irante sur ĝia strato mi senvole pensis pri tiuj pasintaj antaŭaj tempoj, kiam multaj skandinavanoj venis en sudan landon kaj tie, sur bordoj de belulo-Dnipro trovis por si novan patrolandon... Kaj ĝis nun restis parenca spirito en tiuj du popoloj, tamen tiel diferencaj laŭ ilia nuna vivado, religio kaj lingvo...

Nun fariĝas jam mallume kaj morgaŭ frue matene vaporsipo venos en Peterburgon, tial mi rapidas fini tiun ĉi leteron, skribitan malorde kaj senstile, sed almenaŭ tute sincere, laŭ diktado de mia ravigita, dankema koro... Mi rapidas ankoraŭ unu fojon diri "adiaŭ" (aŭ pli bone: "ĝis revidiĝo") al miaj karaj svedaj amikoj kaj varme danki por ilia afabla, amika gastameco, kiun ili donis al mi. Al estimata doktoro Zamenhof mi ankaŭ alportas mian koran dankon, ĉar sen li, sen lia Esperanto mi ja tute ne povus vojaĝi en la ĉarman Sverige, vidi ĝian belan ĉefurbon, la modestan Upsala kun ĝia majesta universitato, ekkoni afablajn svedojn, gajajn, tre interesajn "björn'-ojn"-studentojn, amikiĝi kun beletaj, gaje-petolemaj svedinoj. Komence, dum du-tri tagoj mi sentis ian embarason paroli Esperanton buŝe, sed poste tio ĉi pasis, kaj mi babilis en Esperanto egale libere kaj facile, kiel en mia patra lingvo.

Vivu eterne, amata Esperanto, kiu donis al mi tian maloftan amikon,

kiel Jozef Wasniewski, kaj kelkajn aliajn, vivu eterne! Helpadu al noblaj homoj, dissemitaj en ĉiuj anguletoj de l' mondo, ekkoni, ami kaj estimi reciproke unu alian!... Vivu eterne kaj glorigu la nomon de ĝia aŭtoro!...


Al tiu ĉi kora deziro mi aldonas ankoraŭ unu: — ke mi havu eblecon proponi egalan amikan gastamecon al svedoj, kiuj volus viziti Rusujon. Kaj de tuta koro mi diras al ili: "Bone venu!"

A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

11. IX. 1897. Vaporŝipo "Nordkusten".

La redakcio petas, ke fraŭlino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko volu akcepti ĝian sinceran dankdiron por tiu ĉi viva, interesa penetraĵo de ŝia vizito en Svedujo kaj ne malplej por la varmegaj sentoj, kiujn ŝi esprimas por tiu ĉi lando kaj por Esperanto, kiu ne sole konatigas sed amikigas personojn de vaste diversaj nacioj.

La Red.



Gunnel Fatburshustru

de Verner v. Heidenstam.

En arktegmenta ĉambro en la fortikaĵo de Riga sidis okdekjara Gunnel Fatburshustru apud la ŝpinilo. La longaj brakoj estis vejnaj kaj tendenaj, la busto malgrasa kaj plata kiel ĉe maljunulo. Kelkaj maldensaj, blankaj viloj pendis malsupren antaŭ l' okuloj, kaj la tukon ŝi portis ligitan ĉirkaŭ la kapo kiel rondan ĉapelon.

La ŝpinilo murmuris kaj unu trumpetistoknabo kuŝis sur la ŝtona planko antaŭ la fajraĵo.

— Avino, — li diris, — ĉu vi ne povas ion kanti, dum ŝpinas? Neniam mi vin aŭdis, alie ol mallaŭdantan kaj malpaciĝantan.

Ŝi turnis al li por mallonga momento siajn lacajn kaj malbonule malvarmajn okulojn.

— Kanti? Eble pri via patrino, kiun oni metis sur veturilo kaj forprenis al la moskovitoj? Aŭ pri via patro, kiun ili pendigis en la fumotubo de l' bakejo? Malbeni mi volas la nokton, en kiu mi naskiĝis, malbeni mi volas min mem kaj ĉiun homon, kiun mi renkontis. Diru al mi nur unu, kiu ne estas ankoraŭ pli malbona ol lia famo!

— Se vi kantos kanteton, avino, tiam vi ekĝojiĝos, kaj mi tiel dezirus vidi vin gaja ĉi-vespere.

— Tiu kiun vi vidas ludante, ridetande, nur estas majstro de sinkovrado. Mizero kaj hontaĵo ĉio estas, kaj nur pro niaj kulpoj kaj nia malboneco nun venis la Saksoj por sieĝi la urbon. Ĉu vi aŭdas la pafadon? Pafu ili kaj kraku! Kial vi ne iras ĉi-vespere por fari la servon sur la remparo, sed kuŝas tie ĉi en maldiligenteco?

— Avino, ĉu vi ne povas diri al mi eĉ unu solan bonan vorton, antaŭ ol mi foriros?

— Bati vin mi volus, se mi ne estus tiel kaduka kaj kurbigita per miaj jaroj, ke mi neniam plu povas levi mian vizaĝon al ĉielo. Ĉu vi volas, ke mi antaŭdiru por vi? Ili ja min nomas Sibylla. — Ĉu mi diros al vi, ke la malrekta sulko super viaj brovoj signifas frumorton? — Mi vidas jarojn

antaŭen en l' estonteco, sed kiom longe mi vidas, mi trovas nur malbonecon kaj malbonajn intencojn. Vi estas pli malbona ol mi, mi do pli malbona ol mia patrino, kaj ĉio naskiĝanta estas pli malbona ol tio, kio mortas.

Li ekstaris de la ŝtona planko kaj ordigis la brulaĵon.

— Mi diros al vi, avino, pro kio mi ĉi-vespere sidiĝis ĉe vi kaj kial mi petis de vi korovorton. La maljuna general-gubernatoro hodiaŭ ordonis, ke antaŭ la sekvanta nokto ĉiuj virinoj, junaj, maljunaj, sanaj, malsanaj, formigru por ke ili ne malmultigu la panon de l' viroj. Kontraŭiĝantaj estos punitaj per morto. Kiel do vi povos, vi kiu jam en dek jaroj pli longe ne marŝis ol trans la kastela placo ĝis la manĝotejo, kiel vi povos nun ĉirkaŭmigrigi en arbaro kaj kampo dum la vintra frosto?

Ŝi ridis kaj la ŝpinilo pli rapide kaj pli rapide kuris.

— Haha! Mi ĝin atendis, pro tio ke mi ja longtempe kaj fidele zorgis la manĝotejon de l' granda sinjoro kaj gardis ĉion la lian. Kaj vi do, Jan! Ĉu ne timigas vin, ke ne estos pli iu, kiu bakas por vi en la forno kaj faras por vi la liton sur la benko? Kia alia sento loĝas ĉe l' infanoj? Estu glorigita Dio, Dio, kiu fine nin ĉiujn ĵetas sub la skurĝo de sia kolero!

Jan kunigis siajn manojn ĉirkaŭ la buklan sian brunan haron.

— Avino, avino!

— Iru, mi diras, kaj lasu min en paco sidi ŝpinante mian ŝpinajon, ĝis kiam mi mem malfermos le pardon kaj foriros por ke mi liberiĝu de tiu ĉi mizera tera vivo.

Li prenis kelkajn paŝojn en direkto de l' ŝpinilo, sed poste li turniĝis kaj eliris el la ĉambreto.

La ŝpinilo murmuris, murmuris ankoraŭ ĝis kiam la fajro bruliĝis ĝis fino. En la sekvanta mateno, kiam la trumpetisto Jan alvenis, jam staris malplena la arkaja ĉambro.

La sieĝo montriĝis malfacila kaj malrapida. Post la di-servo elmigris el la urbo ĉiuj virinoj dum la neĝaj Februaraĵoj, kaj la senfortaj kaj malsanaj estis metitaj sur portiloj kaj veturiloj. Tuta Riga fariĝis monaĥejo de viroj, kiuj nenion povis doni al la aroj de petegantaj virinoj, iam kaj iam elrampantaj ĉe la remparo. La homoj apenaŭ posedis panon por propra neceso kaj en la staloj disŝiris malsatantaj ĉevaloj unu la alian aŭ ekmanĝis la manĝujon kaj elmordetis grandajn truojn en la ligna muro. La fumo pendis super la bruligitaj antaŭturboj kaj dum la nokto ofte estis vekigitaj la soldatoj per avertantaj sonorilaj sonoj kaj ekprenegis al si de la tegmento la batglavon.

Kiam Jan, la trumpetisto, vespere venis hejmen en la arkaja ĉambro, kiun li kune kun la avino loĝigis, li tamen preskaŭ ĉiam trovis la liton faritan sur la benko kaj tason plenan per ŝimita manĝaĵo apude sur la seĝo. Li hontis ion rakonti pri tio al la aliaj, sed li teruriĝis. Li pensis ke la avino pereis en la negaĵoj kaj nun, pentanta la antaŭan severecon, fantome ĉirkaŭiradis sen trankvilo. En la timigo li tremis kvazaŭ pro febra frosto kaj multajn noktojn li pli volonte dormis malsatante en neĝo sur la remparo. Sed kiam li sin fortigis per preĝado, li fariĝis pli trankvila kaj fine do li eĉ sin sentis pli timema kaj mirigita, se li kelkfoje trovis la benkon netuŝitan kaj la tason malplenan. Tiam li povis sidiĝi apud la ŝpinilo kaj troti ĝin tre malrapide kaj aŭskultadi je la bonkonata murmurado, kiun li aŭdis tagon post tago post sia naskiĝo.

Nu unu matenon okazis ke la general-gubernatoro, la glora sepdekkvinjara

Erik Dahlberg ekaŭdis fortan pafadon. Malpacience kaj kolere li leviĝis el siaj desegnoj kaj konstruaj-modeloj el vakso. Kiel memoraroj el la lumaj vagadoj de lia juneco en la regnoj de l' belo pendis sur la muroj bonegaj kupro-gravuroj de l' ruinoj de Romo, sed lia vizaĝo komence tiel afabla jam estis sulkigita per melanholio kaj rigidiĝis ia trajto de maldolĉeco ĉirkaŭ la mallarĝaj kunpremitaj, preskaŭ blankaj lipoj. Li ordigis sian grandan *allong-*hararon kaj kun la ungo mantreme strekis laŭlonge la maldensa lipharo, kaj kiam li malsupreniris la ŝtuparon, li forte puŝis kun la bastono la ŝtonojn kaj sopiris:

— Ho ni svedoj, ni parencoj de l' reĝoj *Vasa*, kiuj en ilia maljuneco nur povis kulpigi kaj mallatŭdi kaj laste eĉ sidis mallumtimate en siaj propraj ĉambroj... ni havas en nia brusto nigran semon, el kiu dum la jaroj kreskas branĉa arbo, plena je plej maldolĉaj gajloj.

Li fariĝis pli kaj pli maldolĉa, malmola en la animo, ju pli longe li iris kaj kiam li fine staris apud la remparo li parolis al neniu.

Kelkaj batalionoj tie staris kun standardoj kaj muziko, sed la pafado jam silentiĝis, kaj tra la pordo revenis kelkaj vagaj aroj de lacaj kaj sangantaj, kiuj ĵus rebatis la atakon de la malamikoj. Plej poste inter ĉiuj iris ia maldika kaj senforta maljunulo, kiu mem havis ruĝan glavovundon tra la brusto, sed kiu en siaj brakoj pene tiregis antaŭ si unu morte pafitan knabon.

Erik Dahlberg levis la manon super la brovoj por ke li vidu. Ĉu la falita ne estis Jan, la trumpetisto, la knabo de supre, de la fortikaĵo? Li lin rekonis je la bukla bruna haro.

En la pordego faletis la senfortigita portisto sur la ŝtonan palison kaj restis tie sidanta kun sia vundo kaj kun la mortinta knabo sur la genuoj. Kelkaj soldatoj kliniĝis por ekzameni la vundon kaj disŝiris la sangitan ĉemizon super la brusto.

— Kio? — ili kriis kaj paŝis reen. — Estas virino!

Kaj mirante ili sin klinis ankoraŭ pli profunde por ke ili rigardu ŝian vizaĝon. La kapo apogis sin flanke al la muro kaj la fela ĉapelo glitis flanken, tiel ke la blankaj viloj falis antaŭen.

— Estas ja Gunnel Fatburshustru, la Sibylla!

Ŝi malfacile spiris kaj malfermis la estingiĝantajn okulojn.


— Mi ne volis forlasi solan la knabeton en tiu ĉi mondo de malbono, sed ĉar mi vestiĝis en viran veston kaj nokte kiel tage servis inter la aliaj sur la remparo, tial mi pensis, ke mi sen maljusto manĝis la panon de l' viroj.

Soldatoj kaj oficiroj maldecide rigardis je Erik Dahlberg, kies ordonojn ŝi malobeis. Li staris egale malgaja kaj melanholie maldolĉa kiel antaŭe, kaj en lia mano tremis la bastono, frapante la pavimon.

Malrapide li sin turnis al la bataliono kaj la mallarĝaj lipoj moviĝis:

— Mallevigu la standardojn! — li diris.


Trad. V. Langlet.



“Bagateloj.”

Subjektiva defino. — *Demando:* — Kio estas absoluta alkoholo?

Respondo: -- Absoluta alkoholo estas alkoholo, kiu estas absolute necesa al la homo por lia vivo.



Necesa aldono.

Mi ne eraros, kredeble, pensante, ke post ĉiuj publikitaj artikoloj pri ortografio, oni povas rigardi la disputon pri ĝi kiel preskaŭ finita. Kvankam ni tute ne eksciis opinion de esperantistoj, kvankam estis publikataj nur opinioj de 7—10 personoj, tamen laŭ kelkaj simptomoj oni povas vidi eĉ nun, ke simpatio de plejmulto estas pro la ortografio nacia.

Mi ne deziras batali la faktojn kaj elirante ankoraŭ unu fojon — kaj lastan — mi volas nur fari la restantan parton de la laboro. Al ni restas ankoraŭ ekvidi en kia grado la praktikaj rezultatoj de l' disputo konsentas kun ĝiaj logikaj rezultatoj.

Mi memorigas ke la tuta demando estis alkonkludita de mi al la sekvanta silogismo:

S-ro L. postulas por la nomoj nacian ortografion pro manko en Esp. de necesaj (laŭ lia opinio) sonoj;

Esperantisto devas scii nur la sonojn de Esp.; —

Sekve, s-ro L. postulas tian ortografion, ĉe kia esperantisto ne povos tralegi renkontitan de li nomon.

Sekve, diras mi, la unua tezo estas nevera. — Estas videbla ke la tuta demando staras sur tiu ĉi punkto. La silogismo estas konstruita aŭ vere aŭ nevere. Ĉe unua okazo mi estas prava, ĉe dua oni devis simple montri la eraron kaj fari nenion pli. Ĉu faris tion-ĉi s-roj nacioj?

Ne, ili ne faris tion. Vi diras al unua: Vi estas neprava, ĉar logikaj konkludoj el viaj diroj alkondukas al absurdo. Montru, ke tio-ĉi ne estas vera. — Oni riproĉas vin pro malĝentileco.

Vi diras tion saman al la dua. "Vi diras sofismon", oni respondas al vi. Bone; montru tion. Oni montras, dirante, ke, laŭ persona kredo de redirinto, legi kaj vidi estas la sama.

Vi ripetas tion saman al la tria. — Oni respondas al vi per insulto kaj diras sensecaĵon.

Se ni postulas logikon kaj oni respondas al ni per plendo, persona kredo kaj insulto, ni povas diri, ke oni ne trovas bezonan moneron.

Por mi tio-ĉi estas tute sufiĉa. Nun mi povas proklami laŭtvoĉe la sekvantan:

A. Aŭ la *nuna* gramatiko de Esp. aŭ la ortografio nacia. Lingvo, donanta promeson de § 9*) de gramatiko kaj tuj post — la ortografion nacian, — tiela lingvo trompas parton da siaj anoj.

B. Esperanto de s-roj nacioj ne estas Esp. de 1887. Esp. de 1887 montris nenian emon al la biblia arĥeologio. Ĝi postulis de siaj anoj nur scion de ĝia elparolo, sed ne elparoloj de ĉiuj eŭropaj lingvoj. Ĝi ne proklamis, ke legi en ĝi kaj vidi estas la sama. Ĝi ne regalis siajn legantojn per geografia kun modeloj "à la" *Krk!!!*

C. La redakcio de L. I. ne rimarkis, ke publikinte demandon pri ortografio, ĝi publikis maskitan demandon pri aliigo de la gramatiko. Sed ni deziras neniajn maskojn. Se la redakcio de L. I. povis proklami, ke ĝi simpatias ortografion nacian, ĝi devas nun publiki alian demandon: "Ĉu oni devas

*) § 9: "Ĉiu vorto estas elparolata precize tiel, kiel estas skribita."

doni al § 9 alian formon?“ Kiam la respondo estos jesa, ni ĝin akceptos silente kaj ni atendos rezultatojn.

Se s-roj naciaj estos senpartiaj, tiuj-ĉi rezultatoj estos tre interesaj. Rimarku, ke la penso pri nacia ortografio povis aperi nur danke al latina alfabeto de Esp. kaj ke ĝi estas tute ne ebla rilate multaj lingvoj. Sed kiam vi akceptos ĝin — ne reiru. Pro kio lingvo franca, ekzemple, havos privilegion rilate multaj aliaj lingvoj? Kiu donis al ĝi tiun-ĉi privilegion? S-ro Moch aŭ iu pli kompetenta? Faru do el nebla la eblan. Se s-ro Moch tradukos tiam Bibliion, lia traduko devas havi sekvantan vidon: “A. (nomo en antikva-hebrea alfabeto) venkis urbojn (tri nomoj); li kaptis ankaŭ reĝojn (kvin nomoj) kaj li venkis popolojn (dek nomoj)“. Mi dube eraros dirante, ke el ĉiuj biletoj en “Charenton“ tiela traduko estos plej bona bileto.

Mi esperas, ke miaj redirintoj ne estos kolerigitaj, se mi finos mian noton per ŝerco. Mi deziras rakonti al ili historian fakton kaj mi forlasas la nomon de la heroo nur tial, ke mi ne scias ĝian grekan ortografion kaj mi ne deziras ankoraŭ unu fojon ofendi iliajn optikajn simpatiojn

Timu tro kuragajn kuracistojn.

(Fablo, dediĉita al ŝ-roj arĥeologiistoj).

Unu greka filozofo estis tre saĝa kaj talenta homo. Sed li havis fizikan difekton: li havis ĝibon. Kion fari? La Dioj ne donas al homo ĉiujn iliajn donojn. Sed la filozofo, kvankam li estis saĝa homo, ne estis, videble, homo modesta. Li ne deziris havi la ĝibon. Li iris al kuracisto kaj demandis, ĉu li povas lin sanigi. “Jes“, respondi la kuracisto, “ĝi estas tre facila.“ Kaj li metis la filozofon sur teron kaj sur lian dorson oni metis du grandegajn ŝtonojn. Kiam la ŝtonoj estis forigitaj, oni ekvidis, ke la ĝibo, efektive, malaperis.

Bedaŭrinde, la filozofo ne povis ĝui sian sanigon: li estis morta.

N. Borovko.

De niaj abonantoj.

Mi ne estas malnova esperantisto: Nur en aŭtuno de 1895 mi komencis sciigi kun nia lingvo, sed, eĉ ĉe miaj unuaj paŝoj mi vidis, ke la historio de nia lingvo, kiu komenciĝis nur en fino de l' jaro 1887, montras ankaŭ kelkajn krizojn. (Vidu nur: la “Lingvo Internacia“ 1896: n-ro 1 “La nova jaro“; n-ro 4 “Novaj ideoj kaj malnovaj faktoj“; n-ro 6—7 “Kalkula raporto“; la rimarkon en la “Liro“, paĝo 119). — Car en nuna jaro finiĝos dek jaroj de l' ekzistado de nia lingvo, mi permesas al mi prezenti mian opinion, ke tiuj ĉi esperantistoj, kiuj detale kaj plene scias la historion de nia lingvo, farus tre bone, proponinte ĝin al la mondo esperantista. Tiu ĉi verko ĝojigos ne nur novajn esperantistojn (kiel mi), sed certe, ankaŭ la malnovajn, donante al ili malfragmentan historion de nia lingvo.

M. M. Abesgus.

²/₁₄ V. 1897. Baku (Rusujo).

Ĉar dek jaroj nun pasis post la unua aperigo de Esperanto, mi prenas la liberecon proponi, ke la nomoj de ĉiuj ĝis la fino de tiu ĉi jaro altiritaj esperantistoj estos presitaj en la adresaro, eldonota en la majo de l' estonta jaro.

I. Asklöf.

Informejo de esperantistoj.

Ŝanĝitaj adresoj de niaj abonantoj:

D-ro *L. Zamenhof*; ul. Dzika n-ro 9. *Varsovio*.

S-ro *N. A. Borovko*. *Pavlograd* (gub. Ekaterinoslavskaja).

S-ro *Hj. Bäckström*. Bodträskfors. *Harads* (Svedujo). — Donas sciigojn al esperantistoj.

S-ro *Molislav S. Bogdanov*, candidat en droit. Rue de l'Impératrice 16. *Bruxelles* (Belgujo).

S-ro *N. K. Alekseeff*, Tüllfabrik, *St. Peterburg*, (Rusujo). — Deziras korespondadi kun Hispanujo, Francujo kaj Italujo.

Agentoj de lingvo Esperanto.

S-ro *Graguar Davidovič Slucki*. *Elisavetgrad*, Rusujo.

Helpanta agento al s-ro Aleksandro Zakrjĵevski: *Drezdena librejo* (Drezdenskij knijnjy magazin dom Mieščanskoy upravj, al s-ro Rabinovič), *Smolensk*. Rusujo.

Korespondadi kun alilandanoj deziras:

S-ro *Ignac Ryšansk*, poŝtestro. *Ĥradec Králová*. Bohemujo.

a) Ni deziras korespondadi en esperanto kun esperantistoj kaj esperantistinoj, aparte kun pentantuloj: ni donas al dezirantaj informojn de vojaĝo en Rusujo. Ni respondas al ĉiu letero. *M. Sapajnikov*. *N. Majer*.

b) Mi deziras korespondadi kun esperantistoj eksterrusaj kaj mi promesas sendi al ĉiu post ricevo kvin da leteroj unu ekzempleron da esperanta verko tradukita el lingvo rusa. Tehnikisto *M. Borisov*.

c) Mi deziras korespondadi kun esperantistoj eksterrusaj. *A. Kostirev*.

d) Mi deziras korespondadi kun multaj esperantistoj alilandanoj, krom esperantistoj rusaj; por demandoj pro komercistaj celoj kaj por aliaj celoj mi povas donadi respondojn. *D. Popov*.

Adreso de a) b) c) d): urbo *Ranenburg* de gub. Rjazana. Kontoro de (konstruata fervojo) inĝeniero I. F. Kurovskij. Rusujo.

Fraŭlino *Stanislava Višnievska*. Poŝtovaja ulica magazeno de s-ro Višnievski. *Smolensk*. Rusujo. — Kun francaj esperantistinoj.

Ag. de L. Esp. *Aleksandro Zakrjĵevski*. *Smolensk*. — Kun junaj esperantistinoj, precipe francaj kaj svedaj.

Fraŭlo (21 jaroj) polo, privata instruisto, deziras korespondadi kun konforma esperantistino. Adr.: *Smolensk*. Rusujo. Al agento de Esperanto A. Zakrjĵevski. Por s-ro N.



“Bagateloj.”

— Kara amiko, mi devas al vi diri, ke via kuzino estas ĉarma virino. Ŝin mi volas edzinigi.

— Pro Dio, ne!

— Kial do?

— Ŝi ne povas tuŝi klavojn.

— Nu, ĉu tio ĉi estas malfeliĉo?

— Permesu, kara amiko, ŝi ne povas tuŝi klavojn, sed tamen tuŝas.

V. A. Ĥr—i.



Adresaro de niaj abonantoj en 1897.

(Daŭrigo.)

En Aŭstrujo kaj Hungarujo:

95. D-ro Balinth, G., profesoro de lingvoj turantaj ĉe l' universitato de *Kolozsvár*.
Ĉe J. Socha.
429. de Brzostovski, A. B., oficisto de la banko kredita. *Gorlice* (Galicien).
430. Mildschuh, Leopold, stud. juris, en *Butschowitz* bei Brünn (Mähren, adr. Unive:sitato de Wien).
431. Güberr, Leopold, k. k. notar. *Feldsberg*.
432. Jankovič, Jakob. *Bischofwart* per *Feldsberg*.
433. Wagner, Karl, instruisto. *Siebenhirten* per *Mistelbach*.
434. Zimmermann, Max., stud. jur. *Margretenplatz 7 III. Innsbruck* (Tirol.) (Trompeter).

En Belgujo:

435. *Chaufoureaux*, Ferdinand. *Hôtel communal Saint Gilles. Bruxelles.*

En Brasilujo:

106. *Machado Reis*, F. P. *Caixa do Correio. Santos.*

En Bulgarujo:

436. *Rajčef*, I., sekretario de la mitnico. *Vidin.*

En Finnlando:

437. *Planting*, A. V., kammarråd. *St. Michel.* (P. Nylén.)

En Francujo:

Ĉe L. de Beaufront.

96. *Beaudoin*, A., chez M. Lecomte, agent de change, 13 Rue Laffitte. *Paris.*
97. M^{me} la Générale *Bocher*, 7 avenue *Labourdonnais. Paris.*
98. *Cenneson*, Paul. 16 rue *Cassini. Paris.*
99. *Crampon*, E. 49 rue de *Linois. Paris.*
100. *Demarest*, Louis, professeur. *Pierrefonds* (Oise).
101. *Lenain*, répétiteur au lycée de *Lille* (Nord).
102. *Lobjois*. *Bury* par *Mony* (Oise).
103. *Pinandier*, A. 3 rue *Léopold-Robert. Paris.*
104. *Ruty*. 18 rue *Rossini. Paris.*
105. *Suire*, Ant. 97 rue de *Pons. Cognac* (Charente).

En Germanujo:

438. *Christiani*, Wilh. Arn. *Slossergasse 21. Strassburg* (Trompeter).

- 439—442. *Trompeter*, W. H. *Schalke* (Westfalen).
112. *Dumpert*. *Nürnberg.*
113. *Schmidt*. „
114. *Ruppert*. „
115. *Sessler*. „
116. *Senninger*. „

En Hispanujo:

443. *Requejo*, D. Juan V. estudiante de medicina. *Santiago*, *Cornúa.*

En Kanado:

Ĉe L. de Beaufront.

107. M. l' abbé *Soly* au séminaire de *St. Hyacinthe*. Rue *Canada.*

En Norvegujo:

444. *Dahle*, L. *Kristiansund, N.*

En Rusujo:

Ĉe V. Gernet, Odessa.

445. *Abelson*, Ilja Josifovič. *Preobrajenskaja*, dom *Poletajeva 44. Odessa* (Odessa f. de "Espero").
446. *Aleksejev*, N. *Peterb. Naberejnaja 20, kv. 10. St. Peterburg.*
447. *Andrjejevski*, Florian *Nikolajevič*. *Apteka Gajevskaho & Popovskaho. Odessa* (Odessa f. de "Espero").
448. *Arnold*, E. A., srino. *Staroportofrankovskaja 14—27. Odessa* (Odessa f. de "Espero").
449. *Avramenko*, Andrej *Ivanovič*, poručik 186 pehotnaho *Kameneckaho* polka. *Uman* (gub. de *Kiev*).
450. *Azančevski*, *Vasilij*. *Admiraltejskaja Naberejnaja, Krestjanskij Pozemelnij Bank. St. Peterburg.*
451. *Balaban*, J. S. *Bazarnaja*, dom *Fajnštejna. Odessa* (Odessa f. de "Espero").
452. *Beljajev*, A. E., pastro. *Pjatigorsk* (Terskaja Oblast).
453. *Bernštejn*, Konstantin *Henrihovič*, advokato. *Puškinskaja*, uĝol *Troickoj*. dom *Marmarino. Odessa* (Odessa f. de "Espero").
454. *Bezin*, Karl. *Orenburg.*
455. *Bezin*, O., poručik. *Orenburg.*
456. *Biblioteka Soljanoho Gorodka. St. Peterburg* ("Espero").
457. *Borizov*, Miĥail *Andrejevič*, teĥnik. *Kontora po postrojke Ranenb.-Paveleckoj ĵel. dorogi. Ranenburg* (gub. de *Rjazan*).
- 458—480. *Borovko*, A. J. kaj N. A. *Karpovka 20. St. Petersburg.*
481. *Bukin*, G. *Preobrajenskaja 22. Odessa* (Odessa f. de "Espero").

482. Circ, O. O. Torgovij dom "Kunst & Albers". *Vladivostok* (Primorskaja Oblast).
483. Černohubov, Vladimir Aleksandrovič, podporučik. 80-j Kabardinskij polk. *Aleksandropol* (gub. de Erivan).
484. Čulkov, Nikolaj Osievič. Ijemskaia ul., dom Sobolevoj, 1 č. *Arhangelsk*.
485. Dialektov, Aleksandr Aleksejevič. Novij Rinok, dom Milodrovska. *Ploč*.
486. Engelhardt, N. E., juristo, poručik, membro de "Espero". Bogoslavskaja 44—46. *Smolensk*.
487. S:rino Ečinac, Elizaveta Pavlovna. Dmitrovskij pereulok 1, lóg. 21. *St. Peterburg*.
488. Globa, poručik Krepostnoj artillerii. *Vorsovio*.
489. Haller, Eduard Karlovič. *N.-Uralsk*, oblastnoj gorod.
490. Hohman, Haim Jehudovič, profesoro. Koblevskaia 27. *Odessa* (Odessa f. de "Espero").
491. Iljin, G. I., tehnik-zeml mer. Stroitelnaia kontora po prodolženija Jitomirskaho puti. *Berdičev* (gub. de Kiev).
492. Isajev, E. *Verhnij Baliklej* (gub. de Astrahan).
493. Kefala, Mihail Aleksandrovič. Sadovaja 4. *Odessa* (Odessa f. de "Espero").
494. Kefala, Vera Lvovna, s:rino. Sadovaja 4. *Odessa* (Odessa f. de "Espero").
495. Kevrolev, Flegont Semenovič. Vrač 1: ho učastka Sredne-Sibirskoj žel. dorogi. Železnodorojnaja stancija "Ob".
496. Kijkov, A. A., membro de "Espero". Anglijski 25, kv. 14. *St. Peterburg*.
497. Knijnij Magazin Makušina. *Tomsk* ("Espero").
498. Kočergov, Pavel Mihajlovič. Kontora Službi Sredne-Sibirskoj žel. dorogi. *Tomsk* ("Espero").
499. S:rino Kolpičeva, Emilia Germanovna. Preobrajenskaja 42. *St. Peterburg*.
500. Kristal, Gugo Jakovlevič. Grečeskaja ul., Kontora Tovariščestva Krasok n Lakov. *Odessa* (Odessa f. de "Espero").
501. Kuklin, V. K. Orloveckij Saħarnij Zavod. *Gorodišče* (gub. de Kiev).
502. Levik, Julius. *Berdičev* (gub. de Kiev). (de 1:a sept.)
503. Levitski, M., ordinator glaznoj kliniki. Glanzaja klinika. *Kiev*.
504. Lobastov, P. V. Kovaliħa, dom Lohova. *Nijni-Novgorod*.
505. Minut, Pavel N., poručik. Kiročnaja, Kazarmi Gvardejskaho Sapernaho Bataljona. *St. Peterburg* ("Espero").
506. Molčanov, Maksim. Arsenalnaja 5. *Novočerkassk* (Donskaja Obl.).
507. Pesockaja, Aleksandra Andrejevna, s:rino. Vas. Ostr. Bolšoj Prospekt 35, kv. 1. *St. Peterburg*.
508. Pesockij, Nikolaj Fedorovič. Vas. Ostr. Opočinina 74, kv. 2. *St. Peterburg*.
509. Plotnikov, David Moisejevič. Počtovaja, ugol Puškinskoj, dom Anatra. *Odessa* (Odessa f. de "Espero").
510. Pokrovskaja, E. K., s:rino. Učilišče Pravovedenija. *St. Peterburg* ("Espero").
511. Rejzen, J. Nevski 168, kv. 15. *St. Peterburg* ("Espero").
512. Rodinov, Nikolaj. Tovarnaja Stancija Mosk.-Nijgorodskoj žel. dorogi. *Nijni-Novgorod*.
513. Sapoĵnikov, Mihail Mihajlovič, čertejnik. *Ranenburg* (gub. de Rjazan).
514. Seleznet, Sredne-Sivirskaja žel. doroga, Tomskajav etv, *St. Stepanovskaja platforma*, 67-ja versta.
515. Slucki, Grigori Davidovič. *Elisavetgrad* (de okt. 1897).
516. Sokolov, Aleksej Ivanovič. Vozviženjskaja 4. *St. Peterburg*.
517. Sutkovoĵ, A., membro de "Espero". *Voznesenskoje počtovoje otdelenije* (gub. de Smolensk).
518. Ščerbinski, Nikolaj Nikolajevič. Preobrajenskaja, dom Papudova. *Odessa* (Odessa f. d. "Espero").
519. Šibkov, Aleksej Ignatjevič. Kontora E. K. Knorre. *Krasnojarsk*.
520. Tatkin, Puškinskaja 47. *Odessa*.
521. Tiħomirov, I. S., membro de "Espero". *St. Konstantinovskaja* (Oblast Vojska Donskoho).
522. Tupikin, Efim Kozmič. *Ejsk* (Kubanskaja Obiast).
523. Turovski, S. A., tehnik. Kontora Službi Puti Sibirskoj žel. dorogi. *Tomsk* ("Espero").
524. Valdenberg, A. d:ro. Str. Grzybowska 5. *Vorsovio*.
- En Svedujo:**
525. Söderström, J. V., paroħestro. *Norsjö*.
- En Svisujo:**
- Če L. de Beaufront.
108. Roux, E. professeur. Villa des lauriers. *Nyon*.
- Pošta abonanto:**
526. Nekonata adreso.



La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
 - „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
 - „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
 - „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
 - „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
 - „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.
- Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Sinjoro N. Arduin

komercisto en *Bordeaux*, 11 rue *Turenne*, Francujo, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Dansk Folketidende

eldonata kaj redaktiata de kand. teol. K. **Bjerre**, Sorö altlernejo, kaj de **Ferdinand Nielsen**, celas por la kristeca kaj popola lumigado kaj la klerigado de demandoj de l' tempo kaj promesas enhavon de bonajn rakontojn.

Kosto de 1/4 jaro kr. 1.

Mi komencis kolekti Evangeliojn de tuta mondo kaj estos kore danka al ĉiu, kiu sendos al mi Evangelion de sia patrujo aŭ por mono aŭ por ŝanĝo de io.

Al. Bernstein.

Jalto, Rusujo, *Krimo*, *Aŭtska strato*, d. *Kruman*.

Eldonoj de societo "Espero":

2) "KAIN" de lord Bajron. Traduko de A. Kofman.

1 fr. = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop.

3) "JARLIBRO ESPERANTISTA DE 1897". Jubilea eldono.

1 fr. = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop.

Rabato: ĉe 100 ekz. = 40 proc., 50 ekz. = 20 proc.

La libroj estas riceveblaj de societo "Espero" en Peterburgo.

Nova vortaro.
Esperantisk-svensk
Ordbok,

Vortaro Esperanto-sveda
de **P. Nylén**,

eldonita de Klubo Esperantista en Uppsala.

Kostas kr. 0,75 (= fr. 1,10).

Rabato, kiam oni aĉetas kelkajn ekzemplerojn.

Ricevebla de

Klubo Esperantista en Uppsala.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	Paĝo.
<i>El Francujo</i> , de L. de Beaufront	145
<i>Novajoj</i>	148
<i>Letero al la red.</i> de L. I. de A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko	149
<i>Gunnel Fatburshustru</i> , de V. Langlet (trad.)	152
<i>Necesa aldono</i> , de N. Borovko	155
<i>De niaj abonantoj</i>	156
<i>Informejo de esperantistoj</i>	157
<i>Adresaro de niaj abonantoj en 1897</i> (Daŭrigo).	158
<i>Anoncoj</i>	160